## *Deklaracio pri la balotado de la Komunumo*

**Internacia Asocio de Laboristoj (IAL) [AIT / IWA]**
**Federacia Konsilio de la Parizaj Sekcioj**
**Federacia Ĉambro de la Laboristaj Socioj**

Afiŝo
Parizo, la 24an de marto 1871

**Kolekto *Afiŝoj de la Pariza kaj Liona Komunumoj 1870-1871***

(Originala bildo de la afiŝo:BDIC
Tradukintaro: Kolektivista Rondo de LPK de Valencio
*Aranĝo: grupgerminal.org en Alejandría Proletaria)*

FRANCA RESPUBLIKO

Libereco Egaleco Frateco

INTERNACIA ASOCIO DE LABORISTOJ

FEDERACIA KONSILIO DE LA PARIZAJ SEKCIOJ

Federacia Ĉambro de la Laboristaj Socioj

LABORISTOJ,

Longa sinsekvo de malsukcesoj, katastrofo kiu ŝajnas konduki nian landon al tuta ruino, tiel estas la bilanco de la situacio kreita en Francio de la registaroj kiuj dominis ĝin.

Ĉu ni perdis kvalitojn necesajn por resaniĝi de ĉi tiu malnobleco? Ĉu ni estas tiom degeneritaj de suferi rezignacie hipokritan despotismon de tiuj, kiuj fordonis nin al eksterlandano, kaj ne retrovi sufiĉe da energion ke por igi niajn neeviteblan ruinon en la civila milito?

Lastaj okazintaĵoj pruvis la forton de la pariza popolo kaj ni estas konvinkitaj, ke frateca interkonsento baldaŭ pruvi lian saĝon.

La principo de aŭtoritato estas nun jam senpova por restaŭri la ordon en la stratoj, por revigligi la verkon en laborejoj, kaj tiu ĉi senpoveco estas ĝia nego.

La ne solidareco de la interesoj estas kreinta la ĝeneralan ruinon, estas generinta la socian militon;oni devas demandi al libereco, egaleco kaj solidareco, ke garantu ordon sur novaj fundamentoj, ke reorganizu la laboron, kiu estas la unua kondiĉo.

LABORISTOJ,

La komunuma revolucio asertas ĉi tiujn principojn kaj forigas ĉiun kaŭzon de konflikto en la estonteco. Ĉu vi hezitos doni vian finan subtenon al ĝi?

La sendependeco de la komunumo estas la pruvo de kontrakto kies klaŭzoj libere debatitaj ĉesos la antagonismo de la klasoj kaj certigos la socian egalecon.

Ni postulis la emancipacion de laboristoj kaj la komunumaj delegacioj estas ties garantio, ĉar ĝi devas provizi ĉiun civitanon de la rimedoj por defendi siajn rajtojn, por kontroli efike la agojn de siaj komisiitoj ŝarĝitaj de la administrado de siaj interesoj, kaj difini la progreseman aplikon de sociaj reformoj.

La aŭtonomeco de ĉiu komunumo forigas tutan subpremadon al siaj postuloj kaj firmigas la Respublikon en lia plej alta esprimo.

LABORISTOJ,

Ni batalis; ni lernis suferi pro niaj egalecaj principoj; ni ne povas retroiri kiam ni povas helpi meti la unuan ŝtonon de la socia konstruaĵo.

Kion ni estas postulita?

La organizon de la Kredito, de la Ŝanĝo, de la Asocio tial ke ĝi garantu al Laboristo la plenan valoron de lia laboro;

La instruadon senpagan, sekularan kaj integran;

La rajton de Kunveno kaj Asocio, la absolutan gazetaran kaj civitanan liberecon;
La organizon ekde la urba vidpunkto de la servado de polico, armeo, higieno, statistiko, ktp.;

Ni estas trompitaj de niaj regantoj, ni eniris en ilia ludo, dum ili alterne karesis kaj subpremis la frakciojn kies antagonismo certigas ilian ekziston.

Hodiaŭ la popolo de Parizo estas klarvida, ĝi rifuzas tiun rolon kiel infano gvidata de gvidinstruisto, kaj en la urbaj balotoj, kiuj estas la rezulto de movado kies ĝi mem aŭtoras, ĝi memoros ke la principo reganta la organizon de grupo, asocio, estas la sama kiu devas regi la tutan socion, kaj same kial ĝi malakceptus ajnan administron aŭ prezidanton altruditan de ekstera potenco, malakceptos ĉiun urbestron, ĉiun prefekton altruditan de eksterlanda registaro al siaj aspiroj.

[La popolo de Parizo] asertos sian superan rajton de voĉdoni Asembleon, esti mastro en sia urbo kaj formi kiel konvenu al ĝi sian municipan reprezentanton sen intenci altrudi ĝin al aliaj.

Dimanĉe, la 26an marto, ni estas konvinkitaj pri tio, la popola de Parizo sentos honorita voĉdoni por la Komunumo.

La delegitoj ĉeestantaj en la nokta Kunsido de la 23an de marto 1871:
Federacia Konsilio de la parizaj sekcioj de la Internacia Asocio:

| | |
|---|---|
| AUBRY (Federación..) | LEO FRANKEL |
| BOUDET | H. GOULLÉ |
| CHAUDESAIGUES | LAUREAU |
| COIFÉ | LIMOUSIN |
| V. DEMAY | MARTIN LÉON |
| A. DUCHÊNE | NOSTAG |
| DUPUIS | CH. ROCHAT |

Federa Ĉambro de la Laboristaj Socioj:

| | |
|---|---|
| CAMÉLINAT | LAZARE LEVY |
| DESCAMPS | PINDY |
| EVETTE | EUGÈNE POTTIER |
| GALAND | ROUVEYROLES |
| HAMET | SPOËTLES |
| JANCE | A, THEISZ |
| J. LALLEMAND | VERY |

